**B U L T E N O**
DE ESPERANTISTA KLUBO ČE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2
N-ro 54 Majo – julio 1959

Aperas laŭbezone.
Pri enhavo respondecas
Jiří Havlík, Plamínkové
12, Praha 7, t. 736-37

## V A R S O V I O

Ni ne intencas mediti pri la mistera aritmetiko de datrevenoj, kiu hodiaŭ regas tutmonde, ne estanta tiel simpla kia ĝi ŝajnas je unua rigardo, same kiel aliaj bazaj aferoj de homa vivo. Kie serĉi ĝian devenon? Ĉu en la komuna bezono de homoj jubilei, ion festi? Ĉu en la komerco, ĉar multaj opinias, ke festojn elpensis komercistoj? Ĉu en la dekuma sistemo, kies agresio nun jam kondukis ĝis al fantazia kreaĵo de artefarita numera lingvo? Estus terno por almenaŭ diploman studon. Kiu posedas sufice da libera tempo, trafoliumu amason da diversaj kajendarioj kaj speciaj jarlibroj nepre bezonataj en ĉiu redaktejo, kaj igu specialisto „datrevenisto“, kiu poste multe utilos al ni solvon de la problemo ni lasu al niaj posteuloj akceptante la kategorion: La mondo devas datrevenadi, do ankaŭ ni datrevenu! Las kuraĝa ĉijara kongresurbo preparas vere indan feston al sia granda filo. Ĉar kiamaniere plibone honorigi Majstron ol per eksterordinara aranĝo de la movado kreita de li mem? Dum proksima tempo esperantistoj en la tuta mondo /laŭvorte!/ direktos do siajn rigardojn al Varsovio. Jam duan fojon en nia historio: unue en la maltrankvila antaŭmilita jaro 1937, kiam Hitler estis frenezigita okcidentan mondon. Partoprenis tiam nur 1.120 anoj. Komparu kun la nuna stato: Sub honora protektadp de la ministro prezidanto de Pola Popola Respubliko Jozef Cyrankiewicz okazos en la Jubilea Jaro 1959 dum la semaino de 1-a ĝis 8-a via Palaco de kulturo la 44-a Universala Kongreso de Esperanto al kiu, laŭ Oficiala statistiko aliĝis ĝis fino de aprilo: Afriko Suda 1, Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 48, Belgujo 23, Brazilo 4, Britujo 88, Bulgarujo 126, Ĉeĥoslovakio 14, Cejlono 1, Danlando 79, Etiopio 1, Finnlando 36, Francujo 186, Okcidenta Germanujo 85, Orienta Germanujo 8, Hispanujo 9, Hungarujo 16, Indonezio 1, Islando 2, Italujo 115, Izraelo 4, Japanujo 3, Jugoslavio 45, Kanado 2, Karoko 5, Meksikio 2, Monako 5, Nederlando 85, Norvegujo 27, Novzelando 5, Pollando l066, Portugalujo 2, Rumanujo 6, Sovetunio 16, Svedujo 136, Svisujo 26, Turkujo 3, Urugvajo 1, Vietnamo 2, Usono 15. Entute 2301 el 41 landoj /pasintjare 1609 el 34 landoj/.



Certe tiu ĉi nombro estus multe pli granda, se ne ekzistus obstakloj, per kiuj abundas nia dividita mondo, kaj se ĉiuj dezirantoj povus aliĝi. Sed tamen la atingita nombro montras klare, ke malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj, ĉu financaj ĉu aliaj, la ideo da D-ro Zamenhof post cent jaroj de lia naskiĝo forte floras kaj en la estonta unuigita mondo certe efektiviĝos

jmh

ESPERANTA KLUBO en PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 2, Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.

PROGRAMO

de kunvenoj dum somera sezono estas neregula. Pasintan programon ni ellasas pri aliaj gravaj sciigoj. Laŭ nia lasta informo anoncis sin provizore 94 eksterlandanoj, kiuj deziras renkonti niajn membrojn en Praha dum julio-aŭgusto. Tiu nombro verŝajne ne estas kompleta, do kelkaj malfeliĉuloj uioj restantaj en la urbo certe travivos varmajn tagojn. Helpu ĉiuj, kiuj kapablas? Informojn pri vizitantoj afable donos s-ano J. Šustr je nia korespondadreso.

MEMBROJ KAJ AMIKOJ.
GEEDZIĜOS: F-ino Věra KOŘÍNKOVÁ kaj prom. ĥem. Vlastimil NOVOBILSKÝ la 18-an da julio en Brno. Alportu tiu ĉi tago al ambaŭ veran feliĉon kaj fariĝu fondo de fama verda familio. Malgraŭ ilia merito la redakcio rezignas pli detale skribi pri gesamideanoj tiel ĝenerale konataj, kies verko rakontas mem.

NIA ESPERANTUJO.
TÁBOR. Esperanto-rondeto ĉe Osvětová beseda /Kleriga domo/ kunvenadas ĉiun ĵaŭdon je la 20-a horo en urba legejo en la Kleriga domo. Vintre efektiviĝis malgranda kurso, kiu rezultis 4 novajn membrojn de la rondeto. En propagandvendejo de tabaka lndustrio ili aranĝis montrofenestron kun granda afiŝo pri UK en Varsovio kaj esperantaj gazetoj. Ni dankas por raporto kaj atendas novan.

PLZEŇ-DOMAŽLICE. Sekcio de lernado kaj kulturo ĉe Konsilantaro ONV en Domažlice turnis al Esperantista rondeto ĉe ZK ROH /uzina klubo/ de Entreprenoj V. I. Lenin en Plzeň kun invito aranĝi dum la tradiciaj "Ĥodaj festoj", ĉefe la 15-an kaj 16-an de aŭgusto Esperantistan Informejon por eksterlandaj vizitantoj. La rondeto transprenis tiun taskon kaj preparas jam ĉion por bone propagandi nian socialisman vivon kaj utiligi lnternacian lingvon. Jen bona ekzemplo!

PREŠOV. Fondita nova rondeto ĉe Kleriga domo, la 16-an de junio. Unuan kunvenon ĉeestis gesamideanoj el Bardějov. Ni kore salutas kaj atendas novaĵojn.

TŘINEC . Esperanto-rondeto ĉe uzina klubo de Ferfabriko de Granda Oktobra Socialista Revolucio aranĝis la 5-an de julio 1959 laborkunvenon sur monto Javorový. La antaŭan sabaton okazis interkonatiga vespereto, kies programon pliriĉigis samideanoj el la Pedagogia Liceo en Cieszyn /Pollando/.

DIVERSAJ SCIIGOJ.

STATUTO de ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO aperis la 31-an de marto 1959 en 9-a kajero de Oficiala Bulteno de Ministerio por lernado kaj kulturo kiel instrukcio No. 27. La laboron de ĈEK gvidas Kleriga instituto en Praha.

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO okazas čijare en LÁZNĚ BĚLOHRAD 12. - 23. 7. La 18-an de julio oni aranĝos grandan someran karnavalon en la parko Bažantnice. Dimanĉe la 19-an estos solene remalfermita la belega ALEO DE D-ro ZAMENHOF je la lo-a horo antaŭtagmeze. Venu amase!

SOMERAJ ESPERANTO TENDAROJ /SET/ 1959 - aranĝas ilin junularo en du lokoj.
1. Červená n.Vlt. 3 etapoj /5.-18.7. C,D, 19.7.-2.8. B,C, 2.8.-15.8. A,B,/ apud rivero en la valo de estonta /jam venontjare/ lago de Orlik-valbaraĵo.
2. Lančov apud Vranov-valbarajo 2 etapoj /19.7.-1.8.infana A,B, 2.8.-15.8. B,C. Aĝo almenaŭ 14 jaroj, infanoj 11 jaroj. Prezo por unu etapo estas Kčs 250,-. Informojn kaj aliĝilojn donas Dieter Berndt, Ková Kamčatka, Petřvald apud Karviná.

ATENTU!!! Se vi volas aboniĝi al EL POPOLA ĈlNIO, NUNTEMPA BULGARIO, POLA ESPERANTISTO, ktp., mendu ilin tuj. ĉe ORBIS, Praha-Vinohrady, Stalinova 46, kiu akceptas mendojn por 1960 nur ĝis la 31-a de Julio 1 Ne malfruiĝu!

NUNTEMPA BULGARIO. Ĉar ne plu estas eble aboni tutan jarkolekton 1959 de tiu ĉi belega kultura revuo, rekomendis al ni la eldonejo kolekti la abonojn par la dua duono de ĉi tiu jaro. La abono kostas Kčs 6,- /ses kronojn/. Ni varme rekomendas al niaj gesamideanoj kapti ĉi tiun okazon. La abonpagon sendu al J.Šustr, Dlouhá l0, Praha I. Mendu ankaŭ je sama adreso la bele presitan ĉeĥan lernolibron de Esperanto de Prof .Kilián. Prezo sen porto Kčs lo,-.

KLUBA BIBLIOTEKO en Týnská strato estos baldaŭ finadaptita kaj komencos funkcii verĉajne ankoraŭ dum somera sezono. Ĉiuspeca helpo estas petata. Dankon al ĉiuj, kiuj jam helpis. Ĝia malfermo certe signifos novan etapon de nia klubo. Estas do devo de ĉiu, kiu poste ĝin uzos, helpi ĝin aranĝi.

FAJRERO - gazeto de junularo el Opava. Aperis jam 2-a numero. Ni gratulas al tiu ĉi posteulo de konata TAGlĜo kaj deziras al ĝi longan vivon kaj presan estontecon.

INFORMA FOIRA BULTENO de BRNO -ČSR - nomiĝas kvarpaĝa rotaprintita bulteno, kiu informas esperantlingve pri venonta unua foiro en Brno. Ni ĝoje vidis ĝin.

EL LA MONDO.

KOREA ESPERANTO-ASOCIO fondiĝis la 11-an de aprilo en Fjengjang. En dektrimembra komitato, elektita en la fondiĝa kunveno, troviĝas k-do Song Bong-uk, financa ministro de KDPR /prez./.prof. Gim Baj-zun, rektoro de Pjengjang-a Medicina Universitato /vicprez./ kaj k-do Sin Go-song, drama verkisto kaj direktoro de Stata Teatro de Nacia Arto /vicp./ Saluton oni adresu al Korea Esperanto Asocio.P.O. Kesto No.l6, Pjengjang, Koreio.


Есперанто - Esperanto
Курс мови есперанто.
Kurso de la lingvo esperanto.
Перший урок. Unua leciono,
Алфавіт (друкований) Alfabeto (presita).

ESPERANTO EN LA FESTIVALO N-ro A, organo de esperantoparolantaj partoprenantoj de la 7-a Monda Junulara festivalo en Vieno informas i. a. pri aranĝo de esperantista renkontiĝo. La programo ampleksas 6 tagojn de riĉa enhavo. Solena malfermo de esp. renkontiĝo okazos en "Stadthalle" la 28-an de julio je la 9-a horo.

ESPERANTO KURSO EN SOVETA GAZETO."Robotniĉa gazeta", organo de Centra komitato de Komunista partio en Ukraino, aperanta en Kiev, publikigis la 5-an de junio 1959 unuan lecionon de internacia lingvo, kies partan kliŝon ni represas apude. Varman gratulon!

PACO N-ro 64-65 ĉeĥoslovaka eldono ĵus aperis. Enhavas krom interesaj artikoloj kaj ilustraĵoj raporton pri nova bazo de MEM.

ESPERANTO REVUO INTERNACIA, N-ro 643 /6/ publikigas 1-an numeron de OFICIALA BULTENO de la Akademio de Esperanto kun listoj da komunaj vortoj, propraj nomoj kaj oficialaj radikoj. Fundamentaj radikoj estas nun 2.759, oficialaj radikoj 1.777 - entute 4.536 radikoj. Ĉu ankoraŭ necesas neologismoj?

ŜIPO "L. L. ZAMENHOF". Laŭ Pola Esperanto-radio granda ŝipo, konstruas en Gdansk, ricevos la nomon de Dro L. L. Zamenhof. La baptado de la nova ŝipo estos solene farita okaze de la junulara kunveno, organizita de TEJO en Gdansk.

EL POPOLA ĈINIO 3-a numero ĵus aperis. Enhavo de tiu ĉi belega revuo ĉiam pliriĉiĝas. La rubriko "Esperanto marŝas" donas interesajn informojn pri la movado. Krome la valoraj artikoloj kulturpolitikaj estas nepre legindaj de niaj gesamideanoj, kiuj tiamaniere konatiĝos kun granda kulturo de niaj amikoj en malproksima Azio.

NOVA VORTARO ESPERANTA-ĈINA estas nun finkompilita de Ĉina E-Ligo, ĝi enhavas la tutan vortprovizon de la Plena Vortaro de Esperanto kaj ĝia Suplemento, krome ankaŭ ofte uzatajn geografiajn nomojn kaj liston de E-mallongigoj. EL donos ĝin Komerca Presejo dum plej proksima tempo.

ESPERANTA LEGOLIBRO aperis en Pekino en la fino de marto. Ĝi estas rearanĝita eldono de jam elĉerpita libro kompilita de k-do Tikos kaj estas destinita por progresantoj.

NOVA ESPERANTO-REVUO en VIETNAMIO. "Vietnamio Antaŭen-marŝas". Trimonata kultura gazeto, informanta pri progreso de nova Vietnamio. Jarkotizo de la revuo estas 3 rubloj su 0,75 dolaroj, abonebla ĉe 32, Hai Bá Trung. Hanoi,Vietnamio.

DONACO DE ĈEĤOSLOVAKA REGISTARO AL U.N.E.S.C.O.

Dimanĉe la 12-an de julio 1959 alportis jenaj ĵurnaloj jenan infomon de ČTK:

Vendrede la l0-an de julio transdonis ĉeĥoslovakaj reprezentantoj al la estraranoj de UNESCO en Parizo kiel donacon de la ĉeĥoslovaka registaro EKIPON de salono de INTERNACIAJ NE REGISTARAJ ORGANIZAĴOJ por la kunlaboro kun UNESCO. La instalaĵo estas destinita por la nova palaco de tiu-ĉi internacia organizacio en Parizo. Ĉi tiun ceremonion ĉeestis ĉs. ambasadoro en Parizo J. Urban, ĝenerala vicdirektoro de UNESCO s-ro Thomas kaj pliaj representantoj de la organizaĵo.
La ĉeĥoslovaka ambasadoro en sia parolo akcentia, ke Si tiu donaco estas ESPRBJO DE DEZIRO DE ĈEĤOSLOVAKA REGISTARO PLIE EVOLUIGI LA KUNLABORON KUN UNESCO, kaj deziris al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj, ke en la nova salono bone prosperu iliaj laboroj par la plej grava celo, kia estas evoluo de reciproka komprenemo kaj la kunlaboro inter la popoloj, kaj por la konservo de tutmonda paco. Ĝenerala vicdirektoro de UNESCO Thomas varme dankis al ĉeĥoslovaka registaro por la donaco, kaj akcentis la artisman nivelon kaj la konstruon de donacita instalaĵo. Aparte li atentigis, ke la tuta ekipo estas verko de aŭskultantoj kaj instruistoj de artindustria lernejo!

Ĉeĥoslovaka respubliko faris grandan donacon al la plej granda internacia kultura arganizaĵo de la mondo, por ĝiaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj. Unu el tiuj NEREGISTARAJ internaciaj organizaĵoj estas al ni esperantistoj bone konata. Sia nomo estas UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO /UEA/. Jam en jaro 1954 farigis UEA kunlaboranto de UNESCO, do NEREGISTARA organizaĵo kun konsultaj rilatoj al UNESCO. Kaj Universala Esperanto Asocio estis tiu, kiu al UNESCO prezentis la rezolucion favore al Esperanto, kiu estis akceptita de ĝenerala kunveno de UNESCO en Montevideo dum la decembro 1954! Pri tiu evento skribis esperanta preso de tuta mondo. Ankaŭ multaj altaj gazetoj kaj ĵumaloj naciaj informis siajn legantojn pri tiu afero. Nun ni estas atestantoj de tio, ke nia respubliko grave subtenas la laborojn de tiaj organizajoj, kia estas UEA, ke ĝi klopodas helpi iliajn laborojn, ĝi do celas helpi ankaŭ la laboroj de UEA, subteni ilin, kaj deziras al ili, do ankaŭ al UEA, ke ĝi sukcese laboru en la nova laborejo, ĉar UEA laboras laŭ la vortoj de la rezolucio el jaro 1954 por la samaj noblaj celoj kaj idealoj, por kiuj laboras UNESCO.

Ni ĝojas je tiu ĝi akto de nia registaro, certe por ni esperantistoj ne sensignifanta. Ankaŭ nia modesta laboro akiras per tio eksterordinaran rekonon.

-o-o-o-o-

NOTOJ PRI ESPERANTO-MOVADO EN SOVETUNIO. O.Gardi, Leningrad

De monato al monato pli kaj pli rapide, profunde kaj sukcese kreskas nia movado en Sovetunio. En apartaj respublikoj Ukraino, Blankrusujo, Litovujo, Armenio, Estonio, Kartvelujo kaj apartaj grandaj urboj /Arĥangelsk, Ĥarkov, Gorkij, Rostov ĉe la Don, Kujbiŝev, Ĥabarovsk, Kostroma, Kemerovo, ktp./ la movado jam fuhkcias tre fruktodone.

Ĉiu nova tago alportas novaĵojn pro novaj /lokaj/ organizajoj en.pliaj urboj kaj lokoj. Ĉiutage kreskas la nombro de sovetlandaj gazetoj kaj ĵurnaloj, kiuj, akirante la veran konsciencon, favore skribas pri Esperanto, rekomendas ĝin kaj raportas pri movado. Lastan tempon rapide disvastiĝas la movado en meza Azio. Dum oktobro kaj novembro 1958 en Taŝkento kaj aliaj mezaziaj urboj estis kreitaj multaj rondetoj. Pri tio skribis favore lokajĵ. En domo de Scienouloj en Ĥarkovo dufoje en semajno regule marde kaj vendrede funkcias rondetoj, unu el ili ĉe mezlernejo, kie estas eldonata regule la murgazeto "Verda Steleto".

Firme kaj solide marŝas la movado al sia nobla celo en nia bela urbego Leningrad.
En mezo de jaro 1958 komencis ĉe la Centra Domo de prelegoj la ciklo pri Esperanto je diversaj temoj. Ĉeestis c. 500 aŭskultantoj. Al ĉiu estis donacita la lernolibro de Semenova kaj Teterin, kiu estis ĉiam nur eldonita /eldonkvanto 2000 ekz./. Plimulto de la aŭskultantoj estas nun fervoraj esperantistoj kaj laboras en rondetoj. Tiam instigis ankaŭ Akademiano Obručev

eldoni N-ron 1-an de BULTENO /ruslingva/ kun grava enhavo pri esenco, historio kaj altaj necesaj Informoj pri Esperanto-movado. Baldaŭ forlasos la presejon la dua numero de menciita informilo.
Ĉe Domo de Kulturo de Industrie-Produkta Kooperativo /preskaŭ la plej granda Domo de Kulturo en nia urbego/ estis organizitaj akcioj. La lasta sekcio /prezidanto K. Dvorkin, sekretario J.Maizel/ nombras preskaŭ 500 anojn.
Ĉe DOMO de SCIENCULOJ funkcias la pedagogia sekcio, kiu preparas instruistojn esperantistojn, la sekcio par perfektado, la rondeto par praktika parolado, la rondetoj kun malnovaj esperantistoj kaj multe da rondetoj par komencantoj, kiujn gvidas spertaj esperantistoj. La sekcio havas propran bibliotekon. Ĉe ka Ŝtata Universitato, ĉe pluraj institutoj, lernejoj, diversaj aficejoj, ĉe apartaj fabrikoj kaj uzinoj, ĉe la Palaco de junaj Pioniroj /gvidas instr.
M. Abolskaja/ ekzistas la rondetoj, kiuj fruktodone kaj regule laboras. Dum la lasta tempo en nia urbo estis prelegitaj prelegoj: "Esperanto-movado en Popola Ĉiinio /laŭ la propraj inpresoj de docento N. Koksarskij/, "Esperanto kaj scienco" /akademiano Obručev kaj docento Podkaminer/- "Esperanto-movado en Bungario /laŭ la personaj impresoj k-dino Semenova/ "La novaĵoj en Esp. movado eksterlande kaj en Sovetunio /docento Podkaminer/, "La monato Kontraŭ la minaco de atommilito" /docento Stefanov/, "Esperanto-movado en niaj tagoj en Baltaj respublikoj" /laŭ la propraj impresoj s-ano Larionov/, kaj multaj altaj, malnova Esperantisto, kiu estis ankoraŭ aktiva membro de Peterburga societo "Espero", A.Piljov, akurate kompilas materialojn pri historio nuntempa de Esperanto-movado en Sovetunio. Li zorgeme skribas la analon de nia movado. La 5-an de novembro 1958 aperis el presejo la dua eldono de la lernolibro de Semenova kaj Teterin. Nunjare oni preparas eldonon de Esperanto-rusa kaj ruso-esperanta vortaro, eldonkvanto 5000 ekzempleroj. Baldaŭ oni elpresos Esperanto-lernolibron por blinduloj laŭ Brajl-metodo.
Sukcesa estas la agado de junulara organizaĵo "Aŭroro", havanta l00 fervorajn membrojn, vigle korespondantajn. Ĉe "Aŭroro" fruktodone funkcias grupoj koncerta kaj ĥoro, originala kaj interesa buŝgazeto, teatra rondeto, kiu dum proksima tempo montros la spektaklon, la vortarsekcio, filatela, kaj aliaj vigle laborantaj organizaĵoj.
Ankaŭ blinduloj posedas Esperanto-sekcion, kiu kunvenadas regule /jaŭde/, fervore studas la lingvon /gvidas malnova esperantisto s-ano M.Verbickij/ kaj konstante interkorespondas kun esperantaj blindularorganizajoj en ČSR, Bulgario, Ĉinio, Pollando, Rumanio, kaj aliaj landoj.
Niaj samideanoj multfoje havis okazon dum la pasinta jaro gvidi tra nia belega urbo amason da eksterlandaj gastoj kaj turistoj, Angloj, Svedoj, Finoj, Bulgaroj, Poloj, Japanoj kaj aliaj, kiuj post sia reveno hejmen tre sincere rememoris en siaj gazetoj aŭ personaj leteroj Leningradan kaj la tieajn amikojn el Esperantujo.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## ZAMENHOF EN LITOVUJO

De nia korespondanto el Kaunas Kl.Naudzius ni antaŭ ia tempo ricevis Esperantan tradukon de unu eltiraĵo en la verko de Prof. D-ro Al. Dambrauskase "La estingiĝintaj lumiloj". La aŭtoro en tiu skico priskribas i.a. la restadon de L.L.Zamenhof en malgranda litova urbeto Veisiejai. Ni represas ĉi tie la vivantan bildon el la vivo de la kreinto de Internacia Lingvo:

L.L.Zamenhof, studante en Moskvo, interkonatiĝis kun studento pri farmacio Pikover, kiu, fininte la studon, edziĝis al fratino de Zamenhof, Fania, kaj fondis en Veisiejai apotekon. Baldaŭ post tio Pikover ekmalsanis je psika malsano; invitite de la fratino la frato de Zamenhof - Leono - ekloĝis en Veisiejai, kaj poste, ricevinte kuracistan diplomon, ankaŭ Ludoviko Zamenhof. Komence la kuracista praktiko tie ĉi al li tute ne sukcesis, ĉar la popolo ne estis kutimiĝinta invitadi kuraciston ne kapablante pagi viziton de kuracisto ĉe malsanulo. Krome, Zamenhof havis arogantan konkuranton - kuracist-helpanton Kukliauskis, kiu, estante loka homo, havis pli grandan fidon inter la popolo. Zamenhof vizitadis nur malsanulojn en la bienoj, situantaj en ĉirkaŭaĵo.

Foje, en 1a printempo 1886 lin, revenantan el Gardinas /nelitova Grodno/, en la vilaĝo tute apud Veisiejai haltigis virino, pro doloro ŝiranta al si la harojn. Montriĝis, ke ŝia malgranda filineto, kiu malsanis pro tuso, estis tute perdinta la konscion pro medikamento, donita de Kukliauskis. Zamenhof esploris la korpon de la knabineto; ŝi dum tri horoj certe montris neniajn vivosignojn. Zamenhof komencis revivigadi ŝin per diversaj kuraciloj kaj la infaneton revivigis. Por sia laboro li nenion prenis kaj eĉ restigis unu rublon por aĉeti vinon al la malsana infano. Baldaŭ tra la tuta regiono disvastigis famo pri mirakla flavruĝbarba kuracisto, kaj Zamenhof fariĝiis estimata de ĉiuj. De malriĉuloj li prenadis nenian honorarion, kaj vizitante riĉajn malsanulojn, kolektadis oferojn par medikamentaĉeto al tiuj, kiuj ne kapablas pagi mem. Estante bonkora, li helpadis ankaŭ aliajn homojn en malfeliĉaj okazoj. Foje forbrulis konstruaĵoj al unu terkulturisto, Zamenhof fordonis al li tutan sian monon tiel, ke revenante hejmen, li mem devis pruntepreni. En 1886 al unu hebreo Veisiejaiano, veturigante Zamenhofon al Kaunas, falis la ĉevalo - kaj la mizerulo ploris, perdinte sian pandonanton. Zamenhof, tuŝita de liaj larmoj, donacis al li 50 rublojn par aĉeti alian ĉevalon. Alian fojon en Veisiejai li estis invitita al iu pro la malario arde febranta knabino. La patrino pro doloro estis preskaŭ freneziĝinta.
Dum tutaj du monatoj Zamenhof ne povis forgesi sian ploradon kaj veadon.
Pro tio li decidis forlasi komunan praktikon kaj elektis specialecon de okulkuracisto. Kiel ni vidas, la Veisiejai'a vivperiodo estis periodo de gravaj ŝanĝoj kaj entreprenoj en la vivo de Zamenhof.
En 1887, reveninte el Vieno post la oftalmologia kurso, Zamenhof, kvankam li jam estis ekloĝinta en Varsovio, ofte vizitadis sian fratinon en Veisejai kaj la tutan someron tiujaran li pasigis boatpromenante sur lago Anĉia, ĉar alimaniere li ne povis sin kaŝi de la serĉantaj pacientoj. Multe li laboris ankaŭ nokte; ja tiam li preparis por presigo vortaron kaj gramatikou de la aperonta lingvo Esperanto. Dumsemajne li forbruligadis po 3 funtoj /1 f= 0,4095 kg/ da kandeloj. El Viesiejai li ofte veturadis al Kaunas, kie li estis fianĉigita al Klara Silbernik, filino de unu kaunasa komercisto. Nome en tiu tempo la fianĉino antaŭvideme instigis Zamenhofon eldoni lernolibron de lia nova lingvo, kaj sia patro - estonta lia bopatro - donis al Zamenhof necesan monon par eldoni unuajn lernolibrojn esperantajn. Ofte ja okazas, ke eĉ plej bonaj ideoj restas neefektivigitaj nur pro manko de mono - kaj tial oni povas tute prave demandi, ĉu ne sole dank al tiu ĉi helpo de Litevuja komercisto, kiu kapablis sati ankaŭ ideojn altajn, la mondo nun havas nenian eltrovon de la 19-a jarcento - Esperanton. La 14-an de julio 1887 la cenzuro permesis presi la unuajn lernolibrojn esperantajn. Aŭtune de la sama jaro Zamenhof forlasis Veisiejai, kaj de tiu tempo li kaj lia edzino Litovujon vizitadis nur gastante ĉe siaj gepatroj-gebopatroj...

/Legu: D-ro A.Mbusz: "Dokumentoj de Esperanto", Berlin Ellersick pĝ.79
D-ro Edmond Privat: "Vivo de Zamenhof" /

+++

KANTO de STANISLAV SCHULHOF LARMIGIS S-inon KLARA ZAMENHOF.
Ĉe la komenco de la Zamenhofa jubilea jaro traflugis mian menson agrabla rememoro de1a simpatia Klara Zamenhof, la edzino de la Majstro. Mi havis okazon vidi ŝin kaj interparoli kun ŝi, dum UK en Helsinki 1922. Estis en Malnova Studenta Domo, kie koruso - laŭ mia memoro "Suomen Laulu" direktata de Heikki Klemetti - prezentis kanton de esperantista poeto Schulhof, komponitan de Klemetti. S-inon Zamenhof la kanto emociis ĝis larmoj kaj ŝi varme esprimis sian admiron. /Laŭ "Esperanta Finnlando", n-ro 1/1959/.
En aŭgusto de la nuna jaro la esperantistaro rememoros la 40-an datrevenon de la morto de la fama poeto esperantista, kies verkon siatempe alte aprezis la korifeo de la Esperanta poezio, K.Kalocsay. La ĉeĥaj esp.-istoj en la datrevena monato omaĝos al D-ro Stanislav Schulhof per intima rememora solenaĵo ĉe lia tombo en Pardubice kaj metos florojn sur la lastan ripozejon de la poeto.

/jm/

# NOVA ORIGINALA POEZIO

Mabela lumturo
Konata al mi lumturo,
ne sur marbordo ĝi staras,
aŭdiĝas arba susuro kaj malproksimon vi flaras.
Malbelas tiu lumturo,
nenion ene la lumo –
ĉirkaŭe kveras turturo,
eĥsonas insekta zumo.
Penetras suno kaj luno
larĝajn senvitrajn fenestrojn –
kaj se ne perfidus la fumo,
apenaŭ ies aleston
Vi tie certe supozus.
Audlgu nek pas nek tuso!
Feinan vojon vi krozus.
Aŭ preterkuris nur muso?
Driadoj, nimfoj kaj gnomoj
homajn estaĵojn tie atendas.
Se iam venas la homoj
siajn animojn tuj ili perdas.
J. Staněk -

La urbo sube
Plena da nebul'
rlveron similas strato.
Ŝajnakva spegul´ ...
sube naĝas sen klako
karpetoj ruĝaj
de tramoj en duopo.
Benita vi, miopo,
fantomoj fuĝaj ...
J.Staněk
J.Staněk

La lageto ĉe Mladějov
Verda spegulo onde briletas
ronda spegulo en arbara ĉirkaŭpren´,
ondoj petolas ĉe alven´,
ondoj murmuras, ondoj ridetas,
grumblas mokante kaj svarmas,
blank-ŝaŭme florante jen verde larmas.
fabelon verdan flustras verda ondo
pri nekonata, elrevita loko.
Aĥ, scias mi: En la vespera horo
dum la arĝenta luno brilos,
najad´sur blanka ŝaŭmo trilos
kaj en la herbo da driadoj dancos ĥoro.
Piedpinte iros mi, silente
eble dum danco, kanto, rid´
driadoj kun la homa id´
en nokton malaperos vente…
27.7.1958 Eva Seemanová

Super unu letero …
Kvankam al vortoj
kuraĝo, forto
mankas,
kompare ĝemon,
kiun la sorto
per la ungego
gravuras,
flankas
ĉio alia,
ĉu ploro, ĝemo
muta.
Sen tristo, ĝojo
neniam
tuta
Ne dormos semo …
J. Staněk

Preĝo pasera

1/ Ho, akcipitro,
ie sub azura vitro
ĉiela.
Via ekzisto, birdo,
por mi danĝera.

2/ Ho, akcipitro,
supre, flugilovente
avida.
Bongustas vivo tente
dum vi kaŝita.

3/ Ho, akcipitro!
Surmeti la kirason
min savus.
Ideon akiraĵan
mi ne plu havus.

4/ Ho, akcipitro!
Akrigu vian bekon
sen ĉes
Ungegojn jam deziras
mia eta korp´

5/ Signifos vi la vekon -
kaj se fariĝos mi sorb´
do, jes!
Kial vi miras,
vi raba birdo?

J. Staněk

KORESPONDU !

Ĉeĥoslovakio; Junaj membroj de Ĉeĥoslovaka Ruĝa Kruco deziras korespondi, inters. BK, PM, ludilojn, k.s. kun junaj anoj de R.Kruco.Adr. Čs.červený kříž Přerov n.Labem, ČSR S-ro V. KYBALČIČ, TICHÝ POTOK, poŝto Brezovica n/Tor., L,BK, kcl.

S-ano Jaroslav KOSÍK, DĚTENICE č.lo4 - L,Pí,PK tutmonde,certe resp.

F-ino Maria ČADOVÁ, Stalinova 351 VIMPERK, arto, literaturo, muziko, filmoj, teatro, BK,gazetojn kcl.

S-ano Břetislav Třešňák, Miškovského 4o6, ČESKÝ BROD, L.BK, kcl.

S-ano Jiři SVOBODA, Mošnova 26/1 DĚČÍN VIII. PM,PK tutmonde

Sovetunio: 30 gesamideanoj laboristoj kaj oficistoj dez.koresp,tutmond. Adr. Vitrofabriko "Tarbeklaas" Marati 12, TALUHN, Estonia SSR.

40 estonaj geesperantistoj dez. kor.L.BK, kun ĉeĥoslov.esperantist. pri kulturo, literaturo, teatro, muziko, sporto, Esp. movado, lingvoj, arto, ktp.,inters. il.ĵurnalojn, revuojn, fotojn, PM,BM. Skribu al ni amase indikante viajn interesojn pri korespondado.Respondo garantiata. Adr.: L. TANGSOO, Mannikustr. 14, TÍŠIVA, Estona SSR.

S-ano Boris BARMIN, Karja 1-6 RAKVIRE, Estona SSR.

Esp.-grupo nome:

F-ino Alma BERGHOICE, kantistino instruistino de muziklernejo, kaj

F-ino Elvira SPINGA,- kun muzikemaj samideanoj, inters.muzikaĵojn. Ili havas esperantigitajn solokant.

Aija TURKA - juna arkitektino

Ingrida VÍGAlíTE - oficistino, sercas en ČSR gekoresp. 16-jarajn. Adreso: Kulturdomo,Esp.-rondo, Marta str.Nr.2, LIEPAJA 8..Latvia SSR.

Pollando: S-ano Henryk DAZE, str. Bob.Stránku 1936 cVc5 1./4 WLOCLA- WEK, - 2o-jara, L.JM.BK,jazzo kaj danemuziko, ktp. kel.

F-ino Jagiello Maria, ulica Sty- czynskiego 37, GLIWICE, literaturo, bistorio, belartoj. ,

F-ino Krystyna KTJCHHA, SITKÓWKA k/Kiele - L,BK,gazetoj ilustr., libroj kaj filmaktoroj.Kongresos.

S-ano Leszek ŠELMA. ul.Zagórska 76, KlELCE, 18-jara studento de geolog.tekniko, kolekt.PM kun anim. k.plantoj, kun geesp.el ČSR.

Kolekcjoner Klub RACZEK, Piotr- kowska 211, LÓDZ - inters. PM.BK, kaj_ altjiurgluaĵojn kun ČSR.

S-ano Georgo KAVOLAK, pl.Volnoŝĉi 16, VLOCLAVEK, Pollando, - PM, BK, kun cehoslov., 18-jara, jazzo, dancmuziko, piano k. gitaro.

S-ano Ignacy BOJAKOWSKI. ul.Bocianovo 2o-3, BYDGOSZCZ, kun ČSR k.tutm. psikologio, lingvistiko,ĵurnaloj, filmo, teatro, sporto, ktp. Koresp.en lingvoj:Esper.,angla,germana,pola. Bulgario: F-ino D.NIKOLOVA , zavod "Elprom" cek No.6, SLIVEN, 19-jara L,BK,kun Sovetunio k.Ameriko.

S-ano G.DELCEV, nog.66-7o t MLADĚN 9A5EV, 19-jara, deziras kontakti kun ĉeĥaj esp.-istoj por la reciproka vizitado. Je la sama adr. Skribu al 6 junuloj 19-20-jaraj kiuj dez.kor. kun ĉeĥoslovakaj geamikoj. Rumanio: S-ano Ing.Traian GRADESKU, F.Salviei Ho.9,Raion Lenin,_BUKURESTO, PM, artaj objektoj interŝ.

S-ano Joan B.KELCŜ, KISKANI BRATT.A pastro, kulturo,kutimoj, paemovado, muziko, ktp.

F-ino Anna NÁTlRÁU, CÁramidarilov 116, BAIA^MARE, nova esperantistino dez,4nterŝanĝi insignojn speciale kun ĉeĥoslovakaj ges-anoj.

S-ano Gbeorghe CHIZITA directia Regignata P-T»T.R. - Contabelitate Piteski No.6 , L.,PM.BK.

S-ano Jan DIMITRASKU, Teinleanu 6, PILESTI L, BK, literaturo, inters. Juaoalavio: F-ino Blanka DĚVČIC, Radě Kondora 3,SLAV.POŽEGA N.R.Hrvatsko 18-jara dez.korespondi kun tutmondo.

Grupo de jenuloj 18-jaraj dez.int. BK,L, kun ČSR kaj tutmonde nome:

Pal PEIČ k.Franyo PElč, Šumadinska 3, SUBOTICA

Ladislav LEDENSKI, Šumadinska 11,

Josip HANIČEK "lo.Oktobro" priv.

Sandor Čardaá, Hrástova 28, SUBOJI-CA.

S-ano Ivan HABJAN "Kovinar"^KRANJ, 25-jara maslnteknlkisto L,BK kel. Germanujo: S-ano

Ed.DAVID, Deutschheim- strasge 39, Nurnberg.NSR - medicinstud. inters. BK kun naciaj kostumoj, L.

S-ano H.SCHERWEXT, Freyerstr.il, MITTWE1DA, GDR - korespondos, BK, L. Franouio: Dudek komencantoj 14-jaraj ' " la elementan E-kurson kaj deziras Iforespondi kun samagaj geamikoj el ciuj landoj.

Afranku filatele, Skribu amase al la kursgvidanto, klu trans- donos. - S-ano Lucien BOURGOIS, 21, rue Gambetta HOTELLES-GODAUI* /P-de-C/
Hispanio: S-ano Juan Rodó VÍDAL c/llíonso XII, No 113, 1 , 1 1 JARCE- LONA - dez.korespgndi kaj inters. ĉiu- specajn esperantajojn, alumetetiketojn kaj razil-kovrilojn.

---

BULTENO, informilo dd EKP. Adreso: Dlouhá lo,Praha I.
N-ron 54 ilustris Dolfa Bartošík